

# HEKIS

JUNULARA SEKCIO DE HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO


REDAKTORINO:  
F-INO ITZIAR ARTECHE

Nro. 87 - 1974

Str. Barrencalle Barrena, 7 - 1.<sup>a</sup>  
Telefono 24 44 92 - BILBAO-5



**MUNSTER: L. K. K.-ANOJ PRISTUDAS LA PLANON DE  
LA KONFERENCEJO**



# ENHAVO

5* EJanZ-tendaro.....	1
Notoj.....	2-3
Lingve pri:Edziĝi kaj enamigi.....	4
Kiom longe oni trompis nin!.....	5
30* I.J.K.....	6-7
Li venis el la urbo.....	8-9
Cu "simpatiantoj" utilas?.....	10-11
Deziras korespondi.....	12

La enhavo de la artikoloj ĉi tie publikigitaj ne reprezentas la oficialan opinion de HEJS escepte en okazo de oficiala komuniko; ĝi ankaŭ ne reprezentas la opinion de la Redaktoro; do, pri la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

=====

5\* EJanZ-TENDARO ( 29-12-73 -- 4-1-74 )

La kvina tendaro por la juna Esperantistaro en Nov-Zelando allogis 29 partoprenantojn al izolita ne loĝata farmdomo. Dum la kvin tagoj, la partoprenantoj, (rekorde multnombraj) studis esperanton en malgrandaj grupoj, per diversaj metodoj kaj aktivoj, dum pli ol dudek horoj, (rekorde laborogotaj). Ĉevalrajdo kaj montgrimpado okupis aliajn horojn. Ĉiuj 7 el la gajnintoj de la lerneja ekzameno en Esperanto ĉeestis la tendaron senpage.

Post la tendaro, la junularo, ĉe apuda kongresurbo Wanganui, prezentis publikan koncerton kiu emfazis la avantaĝojn de Esperanto en vojaĝado, kaj ĝiajn eblecojn en literaturo kaj dramo. Post la koncerto oni kondukis publikan enkondukan kurson pri Esperanto, kiun partoprenis plejparte junuloj.

Kaj nia HEJS-tendaro? Ĝi ne okazos!!

.....

N O T O J i

---La itala rondo "La Patrolo" organizas literaturan konkurson en la branĉoj de originala poezio kaj originala prozo. Se vi deziras partopreni, petu regularon ĉe :

INTERNACIA LITERATURA PATROLKONKURSO

Via Pantano, 17

I - 20.122 MILANO

---"Grupo Kvin: Esperanto en la Radio kaj Televido" eldonis longdaŭran gramofon-diskon : "Elektitaj Eroj de Nikolaj Rytikov". Ĝia prezo estas 15 guldenoj plus sendo-kosto 10%. Se vi deziras, mendu ĝin ĉe :

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Nieuwe Binnenweg 176

ROTTERDAM- 3002, NEDERLANDO

---"La Ternistro" estas interesa revuo kun tre varia enhavo : artikoloj, poemoj, spritaĵoj, recenzoj, rakontoj, k.t.p. kun multaj fotoj kaj ilustraĵoj, 52 paĝoj, 22 cm.. Prezo: 100 Ptoj. Mendojn kaj pagojn sendu al :

Prof. ADAN HRYNKIEWICZ

C.C. 58, Suc. 12

BUENOS AIRES- (Argentina)

P A S P O R T A

S E R V O

///////

Ni havas broŝurojn de "Pasporta Servo" de TEJO. Ili enhavas 40 adresojn de personoj kiuj pretas gastigi senpage esperantistojn en 19 landoj sur la 5 - kontinentoj.

Se vi deziras esti gastigata eksterlande ĉe amika etoso, petu ekzempleron al ni. Ĝia prezo estas 65<sup>ptoj</sup>

=====

HUNGARLANDO INVITAS VIN .....

En la hungara lando oni organizos ĉi jare 8E-aran ĝojn. Se vi deziras scii pri datoj kaj lokoj, petu al ni broŝuron.

=====

ESPERANTO BEZONOS KAPABLAJN VERKISTOJN DE LA JUNA ĜENERACIO.

Vi fariĝu tia ellerninte facile per "KOMPLETA LERNOLIBRO DE REGULA ESPERANTO".

Prezo: 350.-Ptoj.. Eldonis la aŭtoro, L. MIMO.  
Str. J. Comas, 19  
SABADELL (Hispanujo)

YYYYYYYYYYYYYYYYYYYYYYYYYYYYYYYY

A T E N T U !!!

Kiel ni diris al vi en la antaŭa bulteno, ni en ĉiu bulteno ni proponos temon por ke vi sendu mallongan komenton. Por la venonta bulteno ni elektis - la temon :

Novaj energiasj rimedoj

Do, bonvolu sendi al ni viajn opiniojn kiel eble plej baldaŭ. DANKON.

& \$ ? ! & \$ ? ! & \$ ? ! & \$ ? ! & \$ ? ! & \$ ? ! & \$ ? ! & \$ ? ! & \$ ? !



LINGVE  
PRI:

EDZIĜI



KAJ

ENAMIĜI

Post edziĝi komence oni uzis la prepozicion JE: edziĝi JE iu. Sed la prepozicio JE pli kaj pli malpliigas en la lingvo, hodiaŭ oni diras: riĉa, plena DE; kontenta PRI; simila AL; preni ĈE mano; -anstataŭ ĉi tiuj, diversaj prepozicioj oni iam uzis JE. Tiel ankaŭ EDZIĜI volas ŝanĝi sian prepozicion, sed, laŭ mia opinio, ĝi ne elektas ĝuste, kiam ĝi volas akompanigi sin per la prepozicio KUN.

Geedziĝi KUN estas logika. Li kaj ŝi iĝas kune geedzoj. Sed edziĝi kun? Li kaj ŝi ja ne iĝas kune edzoj. Li edziĝis kun sia amiko en la sama tempo - ĉu ne ĝusta frazo? Jes ja, ili iĝis kune, samtempe edzoj!

Kion signifas edziĝi? Sin ligi edze AL iu. Sekve plej ĝuste ŝajnas al mi uzi post edziĝi la prepozicion AL. Li edziĝis al ŝi. Ŝi edziniĝis al li. Li eksedziĝis al ŝi. Ŝi eksedziniĝis al li.

Mi ne diras, ke edziĝi KUN, se ĝi enradikiĝos, estos ia granda malfeliĉo. Sed se oni povas ankoraŭ libere elekti, kial ne elekti la pli logikan formon?

Sed dum EDZIĜI KUN estas ankoraŭ tolerebla, ENAMIĜI EN estas tiel mallogika kaj absurda, ke oni devas batali kontraŭ ĝi. Nome, ĝi baziĝas sur plena miskompreno. Oni diras: ENIRI EN LA ĈAMBRON, do oni kredas ĝusta ankaŭ: ENAMIGI EN ŜIN. Sed estas ja granda diferenco! En ENIRI la EN rilatas la ĈAMBRON, sed en ENAMIĜI la EN rilatas la AMON. La analizo de ENAMIĜI estas IĜI ENAMA, do proksimume: DRONI EN AMO. Kaj se ni diras: LI DRONIS EN AMO AL ŜI, ni devas diri ankaŭ: LI ENAMIĜIS AL ŜI.

tao

(El Kálmán KALOCSAY: "Lingvo Stilo Formo")

# KIOM LONGE ONI TROMPIS NIN!

- Kiom longe oni trompis nin !.
- Aliiĝintaj nun, ni rapidas fuĝi kiel la naturo fuĝas.
- Ni estas la naturo, longtempe ni estis malproksime, sed nun ni revenas.
- Ni konvertiĝas en plantojn, en trunkojn, en vepron, radikojn kaj ŝelojn.
- Ni enradikiĝis sur la tero, ni estas rokegoj.
- Ni estas verdaj kverkoj, kune kreskas en la arbaraj malplenaĵoj.
- Ni paŝtigas, ni estas du meze de braveca bieno, tiel spontaneaj kiel la aliaj.
- Ni estas du fiŝoj kune naĝantaj ĉe la maro.
- Ni estas tio kio estas la karobaj floroj, ni disŝutas freŝan aromon sur la vojojn matene kaj vespere.
- Ni estas ankaŭ la malpuraĵo de la bestoj, plantoj, mineraloj.
- Ni estas du rabobirdoj, ni ŝvebas tra la aero kaj rigardas la teron.
- Ni estas du blindigantaj sunoj; ni ambaŭ estas tiuj kiuj turniĝas, kosmaj kaj stelaj, ni estas kvaŝaŭ du kometoj.
- Ni estas du nuboj kiuj translokiĝas en la alto dum tagiĝo aŭ sunsubiro.
- Ni estas du maroj kiuj kuniĝas, ni estas tiuj felicitaj ondoj kiuj rulfalas kaj kunfandiĝas, malsekiĝante.
- Ni estas tio kio estas la atmosfero, travideblaj, gastemaj, trafueblaj, netrafueblaj.
- Ni estas neĝo, pluvo, malvarmo, mallumego, tio kion la planedo naskas kaj protektas.
- Ni promenis laŭ cirkloj, ĝis fine ambaŭ reveni ĥajmen.
- Ni estas malplenigintaj ĉion, escepte liberon kaj niangajecon.

Poezio el la libro: "Herbaj folioj"

Aŭtoro: Wait Whitman

Trad. Enrique Fueyo.



30a INTERNACIA JUNULARA KONFERENCO  
30. INTERNATIONALE JUGENDKONFERENZ

~~DES WELTVERBANDS JUNGER ESPERANTISTEN~~ 4.-10. AUGUST 1974  
LKK/VORBEREITUNGS-AUSSCHUSS: D-44 MÜNSTER, MONDSTRASSE 3  
TELEFON: (025 04) 71 13 UND (025 51) 38 40      TELEX 9715 38

Tutmonda Esperantista Junulara Organizo - 30a IJK

La 30a IJK okazos en Münster (FRG) de la 3-a de aŭgusto posttagmeze ĝis la 10-a de aŭgusto matene. Ĝi distingiĝas pro nomŝanĝo: Konferenco, anstataŭ kongreso.

Por la jara tradicia kunveno, TEJO elektis nun Münster, kiu situas 250 km. sudokcidenten de Hamburgo. Ĝi havas 200.000 enloĝantojn, inter kiuj 30.000 studas ĉe la fama universitato aŭ ĉe iu el pluraj altlernejoj. Gravaj distriktaj, regionaj kaj landaj administracioj elektis Münster por sia sidejo. Tamen, la urbo apenaŭ havas industrion kaj estas ankaŭ tial alloga. Münster estigis episkopa urbo en 804, tuj post ĝia kristanigo. En 1648, delegitoj el tuta Eŭropo renkontiĝis en Münster por subskribi la "Vestfalian Pacon" per kiu finiĝis la Tridekjara milito. La "pacsalono" en la urbodomo ankoraŭ ekzistas kaj servas por oficialaj akceptoj. Tia akcepto povus koncerni ankaŭ la partoprenantojn de la 30a IJK de TEJO.

La ĉeftemo elektita estas "Junularo kaj Edukado", kiu inkluzivas diversajn temojn el la junularpolitika kaj eduka sektoro. Edukaj sistemoj kaj edukaj celoj ne plu konformas kun la hodiaŭa tempo; ili favoras cementigon de klasaj privilegioj, produktas specialistojn por senutilaĵoj. Preskaŭ ĉie evidentiĝas ke la junularo ne plu volas roli sole kiel objekto de edukado, sed ĝi pledas (ofte eĉ ribele) por aktiva, subjekta rolo en la eduka procezo. Objektoj pritraktotaj laŭ provizora programo estas: internacia junulara interŝanĝo, reformo de altlernejoj, kontraŭ-aŭtoritata edukado, lingvo-instruado kaj la laboro de TEJO. Prelegantoj estos inter aliaj Karl-Heinz Walkhoff, membro de la germana federacia parlamento, kaj d-ro Helmar Frank, profesoro pri cibernetika pedagogio en la Altlernejo Paderborn, aŭtoro de "tezoj pri germana lingvo-politiko", kaj ankoraŭ ne esperantista.

En la kadro de la IJK la Komisiono pri Eksteraj Rilatoj (KER) aranĝos seminarion pri la temo "Lingvo kaj Socio", ankaŭ por neesperantistoj. Prof-o Jan Knappert, malnova konato el TEJO-seminarioj, ĉeestos kiel prelegan-



to. Oni atendas partoprenon de neesperantistaj junularaj organizaĵoj kun kiuj TEJO kunlaboras. K E R esperas ricevi finanĉan subtenon de Eŭropa Junulara Fonduso.

Sed, troŝtopi programon de junulara aranĝo sole per labor-kunvenoj estus grava peko. Okazos entute tri dancvesperoj kun partopreno de la konata "Kvarteto Esperanto". Se la financoj ebligos okazos ankaŭ teatra kaj pupteatra prezentoj. La tuttaga ekskurso kondukos en la nordan ĉirkaŭaĵon de Münster; ĝi finiĝos per "Ĝicen-festo", kiel la organizantoj neologismas tradician popolfeston, kies karakterizaĵo estas pafado al ligna birdo.

Laŭ lastaj informoj ĝis nun aliĝis centoj da gejunuloj el 23 landoj. Inter ili ankaŭ delegacio el Soveta Unio, unuafoje en "okcidenta" IJK. Partoprenantoj loĝos en tute nova domo, en unulitaj ĉambroj kun pli ol hotela komforto. Temas pri studenta hejmo finkonstruota en aprilo laŭ la sama konstrumaniero kiel la olimpika vilaĝo en Munkeno.

Pliaj informoj riceveblaj de: 30a Internacia Junulara Konferenco, p/a Gisela Jungkamp, Mondstr. 3. D-4400 Münster, FR Germanujo.

(El informoj ricevitaj de la LKK)



Kiam paĉjo alvenos hejmen, vi ludos kun li.

4-10 AUGUSTO 1974  
ESPERANTO, 44 MONSTER, MONDSTR. 3  
30 INTERNACIA JUNULARA KONFERENCO  
MONSTER/FRG

# LI VENIS EL LA URBO

Mi bone rememoras lin, kiam li alvenis en nian vilaĝon, li estis pala, lia vizaĝo ne estis forvelkita de la sunradioj, kiel estas tiuj de niaj samvilaĝanoj. Malof te la suno "karesis" lin. Kvankam nenion li diris, tuj oni konstatis, ke li venis el la urbo. Ni kompatis lin, ĉar ni eĉ supozis ke li estis malsana.

Miaj amikinoj kaj mi scivoleme promenadis antaŭ li, ni koketadis kaj duonokule rigardadis lin.

Liaj lokaj parencoj prezentis lin al ni kaj ni baldaŭ amikiĝis, tio ja estas normala afero en malgranda vilaĝo kie la gejunuloj estas malmultaj. Ni akceptis lin, kore kaj sincere, per lia veno nia rondo akiris fortan impulson.

Komence li malmulte parolis aŭ partoprenis en niaj konversacioj, ĉio estis stranga por li. Sokis lin nia parolmaniero. sincera, sen granda etiko. Mi memoras, ke iu el miaj amikinoj demandis al li -ĉu ankaŭ vi vizitas tiujn fifamajn lokojn en kiuj troviĝas tiuj malvirataj virinoj?. Ho!, kiom li ruĝiĝis, subite lia pala vizaĝo ŝajnis du grandaj tomatoj, li nur kapablis balbuti, ni ĉiuj ridetis sed interne ni ĉiuj iom hontis pro la malprudenta demando.

Kial?, mi ne scias, sed la fakto estas ke li kaj mi forte amikiĝis. Li estis inteligenta kaj bone instruis min pri la valoroj de la vivo en la urbo, sed malmulte li komprenis pri la batalado de la kapolaboristoj. Li ofte sin sentis supera al ni, la vilaĝanoj, tio ja estas pardonebla peko de la urbaj loĝantoj. Li sciigis, ke oni devas esti tre lerta por trairi la stratojn en la urboj, bone koni la retojn de la transportiloj, sed bedaŭris la venenigitan aeron de la urboj. Li parolis al mi pri la eleganteco de la urba virino kaj ŝia libero, pri siaj kamaradinoj en la oficejo.....

Li fariĝis simpatia, afabla; li kaj mi, kvankam en la kadro de mia amika rondo, ĉiam estis kune, en la balo, dum la promonado ni ĉiam estis unu kun la alia. Nia amikeco fortiĝis, sed nur estis tio, amikeco.

Un tagon, la gerondanoj decidis, ke la venontan dimanĉon ni iru al la rivero por nin bani.. Kia surprizo estis tio por li. Jam en la rivero kaj laŭ natura - kaj vilaĝa kutimo, ĉiu kaŝite malantaŭ alta herbaĵo aŭ arbo demetis siajn ordinarajn vestaĵojn kaj sin surmetis la bankostumon. Kia embaraso tio estis por nia kara urba amiko. Mi memoras ke revenante hejmen mi demandis al li, ĉu sendube li multe enuis en ĉi-tiu, por - vi, stranga banejo?. Tute ne, li respondis, male mi - multon lernis de vi, viaj sinceraj kutimoj estas grava leciono por mi, homo al kutimiĝinta al tiuj modernaj banejoj de la urbaj, en kiuj vanteco kaj fanfaronado estas oftaj.

Alian tagon, ni decidis vespermanĝeti ĉe vinkelo de iu el la gerondanoj. Certe la vino ne estis altgrada, sed ĝi estis freŝa, kio invitis al trinketaĵo. Ni amikece manĝetis kaj kantis, kaj je la fino ni ĉiuj estis tre bonhumoraj speciale nia amiko, kiu bone montris la efikon de la vino, malgraŭ tio ke, laŭ li mem diris, estis al kutimiĝinta trinki fortajn vermojtojn.

Vera kuriozaĵo estis por li la azenoj, sed ekde la tago kiam unu el tiuj bestoj surterigis lin, li ne plu sentis emon nek deziron vojaĝi sur azero.

Ni vizitis la lokan dancejon ĉiudimanĉe kaj eĉ - iris en apudajn vilaĝojn en kiuj oni celebris ĉiun feston. Unu tagon ni decidis reveni hejmen malfrue, je la tria horo matene. La festo okazis en vilaĝo, kiu estas kvin kilometrojn malproksima de nia loĝloko. Ni iris - piede kaj revenis hejmen sammaniere. Nia urba amiko - multe miris pri nia libero, iri solaj nokte kaj tiel - malproksime. Ni multe amuziĝis en tiu vilaĝo. Li kaj mi revenis kune. Multe ni parolis, multe ni rakontis unu - al alia. Subite, en momento de nia irado, mia amiko ĉirkaŭbrakis mian talion kaj kisis min, mi reciprokis lin. Strange, li restis serioza kaj konfusa. Ni, vilaĝanoj, - nakaŭ havas sangon - mi diris -, sed li respondis nenion. Li akompanis min al mia hejmo kaj ni adiaŭis nin.

Finiĝis lia ferio kaj li reiris al sia urbo. Ni - ĉiuj, la rondanoj bedaŭris lian foriron, precipe mi, kiu tiom amikiĝis al li. Li ne plu estis pala, li brunigis. Ni forte rememoras lin, ĉar li estis sincera, edukita, malavara homo. Li promesis skribi sed ĝis hodiaŭ li tion ne faris. Se li iam skribos, mi plie rakontos al vi.

# ĈU "SIMPATIANTOJ"

## UTILAS?

Se oni demandas personon pri la ideo de la internacia lingvo, normala estas respondo en "usa" tempo : Se Esperanto sukcesus, mi tuj ĝin lernus.....

Ci-tiu artikolo ne temas pri tiaj "simpatiantoj" pli-multo el la homoj, sed pri tiuj kiuj post ne atenta kaj senlabora ĉeesto al esperanta kurso, sin - nomas esperantistoj, ne kuraĝante paroli nek legi esperantaĵojn.

Estas multaj tiaj, t.n. krokodiluloj, kiuj - (mal) oftas E-grupojn, malaperigas Esperanton el ili, kaj krome pensas ke ili estas plene partoprenantoj de la movado.

Jes, tiaj "simpatiantoj" (almenaŭ en Hispanujo), konsistigas la plimulton en la esperantaj grupoj kaj organizoj, kaj, foje, eĉ partoprenas en iliaj estraroj pro manko da veraj entuziasmaj esperantlingvuloj.

Do, se ni agnoskas tiun situacion, kion fari? Ni ja devas diri ke se ne ekzistas tiaj "simpatiantoj" ankaŭ ne ekzistus tiuj organizoj, ĉar la mona apogo - de tiu plimulto estas necesa por la pluvivo de la organizoj.

Jes, ili utilas por tiu pluvivo. Sed, ĉu nur pluvivon oni devas celi ? Divastigon de la movado - oni nur atingas per agado de homoj, sed tiun agadon - nur povas plenumi la veraj parolantaj esperantistoj . Kiel povos tiaj "simpatiantoj" propagandi la facile - con kaj internacian efikon de Esperanto se ili mem ne povas aŭ volas eĉ diri vorton en tiu lingvo? Ilia - "emo" antaŭenigi Esperanton ne povas ne malhelpi la - disvastigon de la lingvo, ĉar ridindigas ĝin per sia mema persono.

Nu, jen problemo : "simpatiantoj" estas uti -


laj por pluvivo, sed malhelpas disvastigon. Kompreneble, pluvivo estas nepra, kaj disvastigo povas atendi pli bonajn cirkonstancojn, kiam tiuj "simpatiantoj" esperantiĝos (ĉu revo?).

Mi ne timas, ke nun "simpatiantoj", post legado de ĉi-tiu artikolo ne plu subtenos nian organizon, ĉar, kompreneble, ili ne legas ĉi-tiun revuon. Cetere, ĉi-tiu artikolo ne ĝenos tiujn kiujn ĝin legas, tial ke ili estas E-parolantoj aŭ celas esti tiaj.

Se, malgraŭ ĉio, vi estas unu el tiaj "simpatiantoj" kiu hazarde kuraĝis legi ĉi-tiun artikolon, ne ĉargreniĝu, agnosku vian eble nevolan malhelpon al nia movado kaj de nun ellernu la lingvon kiun vi ĝis nun nur "simpatiis".

ASIER..

Humora  
angulo



El "Anaitasuna"

Jus aperis la unua kursoteksto por la dua sesio de  
SUK. Ĝia titolo estas "Planktono kaj mara produktado",  
de Prof. Enrique Balech.

La ordinara prezo de la teksto estas 320 belgaj  
frankoj (aŭ 33 internaciaj respondkuponoj). Por studentoj  
160 bf (aŭ 17 i. r.) Ĝi estas mendebla ĉe la SUK-adreso:  
Boite Postale 9, B-4000 Liège 3 (Belgujo)

## DEZIRAS KORESPONDI:

JAROMIR HINCICA, 17-jara studento. Li kolektas  
E-insignojn, fromaĝlumarkojn kaj tre interesas pri  
fervojoj. Lia adreso:



Simáčkova 27 709 00 Ostrava-Mar. Hory  
ĈEĤOSLOVAKUJO

FERNANDO PAREDES, 27-jara junulo, maŝindeseĝnisto,  
kun hispana samideano. Li estas hispandevena pro familio  
Li interesiĝas pri ĉio: anekdotoj, vivmaniero, naciaj kuti-  
moj, sportoj, interŝanĝo de bildkartoj, ktp.


Muralla 423, apt. 101

HAVANO 1 (KUBO)

MI AĈETAS ...  
DO MI EKZISTAS



GONZALO.  
("SABADO GRAFICO")



d i s t r a  
P A Ĝ O

AMIKECO